Dum la lastaj ses jaroj la Aŭtoro, kiel reprezentanto kaj honora prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio partoprenis ĉiujn Universalajn Kongresojn en Eŭropo, Azio kaj Ameriko, kaj ĉeestis ankaŭ la regionajn kongresojn en Afriko kaj Aŭstralio. Krom tio li fondis la lingvoinstruadon en la korea Indramang Universitato kaj kuraĝigis la studentojn de la Wonkvang Universitato kaj la Kyunghee Universitato, ke ili pli efike lernu fremdajn lingvojn por pli bone kompreni la kulturon de aliaj popoloj.

Por evoluigi la internaciajn kulturajn kaj sciencajn rilatojn li fondis Eŭrazian Kulturan Centron kaj organizis Esperanto-kursojn en la Srinakharinwirot Universitato kaj en la Mongkut Reĝa Teknika Universitato en Tajlando. Li prelegis pri gravaj sociaj kaj ekonomikaj problemoj en la Ĉina Socioscienca Akademia Konferenco en Pekino, en la Pola Scienca Akademia Konferenco en Pollando kaj en la Internacia Kongresa Universitato en Vjetnamio.

La prezidanto de Litova Esperanto-Asocio petis, ke li havu prelegserion en la Somera Universitato dum la 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj kun la titolo: „*Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigos la mondon?*" En tiu prelegserio li trarigardas kiel fariĝis la lingvoj de la plej grandaj mondimperioj internacie uzataj komunaj pontolingvoj en la homa historio. Li ŝokas la esperantistajn legantojn kiam li konkludas, ke 130 jarojn post la naskiĝo de Esperanto evidentiĝas, ke ne estas reala ŝanco ke la Zamenhofa revo realiĝu en la nuna mondo, do Esperanto ne povos estiĝi vaste uzata kaj oficiale akceptita komuna lingvo en la proksima estonto. Malgraŭ tio la mesaĝo de la prelegserio ne estas pesimisma. La Aŭtoro laŭ siaj personaj spertoj klarigas en la lastaj prelegoj, ke jam estas esperantistaj komunumoj kiuj plibonigas la vivon de iliaj membroj, kaj tamen estas ŝanco ke en la ankoraŭ ne antaŭvidebla malproksima estonto Esperanto estu la ĝenerala „*lingua franca*" (komuna pontolingvo) de la mondo.



Prof. Dr. Nanovfszky György
Ambasadoro de Hungario
en Moskva, Jerevan, Tbilisi, Baku, Taskent,
Ashabad kaj Singapur

ISBN 978-963-571-498-8

Dr. Márkus Gábor ĈU ESPERANTO PLIBONIGIS/PLIBONIGOS LA MONDON?




**Dr. Márkus Gábor**

# ĈU ESPERANTO PLIBONIGIS/PLIBONIGOS LA MONDON?




## ESPERANTLINGVE ĈIRKAŬ LA MONDO